



HOMOJ NI ESTAS
KAJ NENIO ROMA
ESTAS AL NI FREMO

TRA LA MONDO
EN LA MONDON VENIS
IRAS FORTA VOKO
PER FLUGILOJ DE FACILA VENTO.

Kulturaj Kajeroj

E.M.A.M.E. →

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44000 NANTES, Francujo

J A R A B O N O :

P. BABIN

Jarabono : 60 fkoj

13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61 L

1986 - 1

(JANUARO - FEBRUARO - MARTO)

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... la skulptita kaverno de Denezé



... Leonardo da Vinci (II-a parto)

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Grésillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangeul)	2
La skulptita kaverno (tr.F. Boyet)	3-4
Paĝo de la Geknaboj	5
Leonardo da Vinci H. Röllinger	6-8
Niaj Poetoj	9
La Koko kriis je la tria fojo (S. Boniol)	10-11
Por via distro (C. Cavalié)	12
La viede Grésillon	13-14
Nia Konkurso	15

El Grésillon

1987 estos granda festo-jaro por la esperantistoj kaj ankaŭ por la cetera mondo, kvankam tiu ĉi ankoraŭ ne konscias pri tiu fakto. Ĉiuj asocioj, grupoj, ankaŭ unuopuloj faros sian eblon por informadi en sia medio.

Por multaj esperantistoj ankaŭ 1986 estos datreveno de du okazaĵoj, unu ĝojiga, la alia malĝojiga. La 16-an de septembro 1951, antaŭ 35 jaroj, leĝe naskiĝis la Kooperativa Asocio "Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj", kiu poste akiris la bienon "Grésillon" kaj alportis multon al Esperanto kaj al la esperantistoj. Je tiu dato estis elektita prezidanto de la Asocio Henri Micard, kiu ne nur revis pri akiro de domo fare de kaj por la esperantistoj, sed batalis por realigi tiun revon. Sed la 26-an de majo 1966, antaŭ 20 jaroj, mortis, post doloriga malsano pli ol dek-jara la fondinto de Grésillon. Pro tio 1986 estas ankaŭ malĝojiga datreveno.

KULTURAJ ARANĜOJ 1986

Modifo de la Programo

La lasta anoncita periodo ne okazos. Anstataŭ ĝi, de la 26-a ĝis la 31-a de aŭgusto okazos la

4-a Franc-Germana Junulara

Renkontiĝo

Ĉefa temo: Malŝato inter popoloj

Nia Konkurso
Vidu paĝon 15

Esperanto tra la Mondo



GRAVA REZOLUCIO DE UNESKO-

La 10-an de decembro 1954 la 8-a sesio de la ĝenerala konferenco de UNESKO, en Montevideo, akceptis, je la pli multo de la voĉdonantoj, rezolucion pri esperanto. D-ro Lapenna estis la tiama reprezentanto de U.E.A.

La 8-an de novembro 1985, la 23-a ĝenerala konferenco, en Sofio, post lerta agado de la observanto de U.E.A., S-ro T. Sekelj, voĉdonis ankoraŭ pli precizan kaj favoran rezolucion pri la internacia lingvo.

Tiu dokumento aparte bonvena je la sojlo de la centjara datreveno de esperanto, alportas oportunan helpon al la esperantistoj, kiuj uzas ĝin grandskale. Interalie, la rezolucio memorigas, ke depost Montevideo, "esperanto faris konsiderindan progreson, kiel ilo de kompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj". Ĝi rekonas "la grandajn eblecojn, kiujn esperanto prezentas por la internacia kompreniĝo kaj la komunikado..." kaj "invitas la membroŝtatojn marki la centjariĝon de esperanto per konvenaj aranĝoj".

Ĉiuj esperantistoj konigu tiun tekston en la kulturaj medioj kaj al la politikistoj kaj ĵurnalistoj

KIEN VI IROS EN 1986 (sekvo)-

-Migrado en la Sudaj Alpoj, en la regiono de Sisteron, Francio-
Inf. G. Gabillon, 32 r. Renault, 33200 Bordeaux-Caudéran.

- 9-a Internacia Esperantista Semajno, en la Nordaj Alpoj, 30/8 06/9 - Inf. Centre Culturel Esperanto, 5, r. du Dr Roux, 34000 Montpellier

-Internacia Kultura kaj Turisma Semajno, en Pau, Francio, 22-29/07. Inf. Esperanto Pau-Adour, La Pépinière Av. Robert-Schuman, 64000 Pau.

- 37-a kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia en Rouillé, Vienne, Francio, 26-7/ 3-8. Inf. P. Cousson, 64 Le Hameau des Plaids, Nouillé-Maupertuis, 86340 La Villegieu du Clain.

- 5-a Sejna Esp. Rendezuo, 12/13- de aprilo, en Le Mesnil St Père, Francio. Inf. S. Bourot, 15/B rue Morel Payen, 10000 Troyes.

- Franca Nacia Kongreso de Esperanto, en Gerardmer, 16/20-5, Pentekosto. Inf. Madeleine Roux, 9 square A. Briand, 54500 Vandoeuvre.

- Por ĉiuj renkontoj en Hungario skribi al: Express, esperanto-sekcio, Szabadsag, ter 16, H-1395 Budapest.

EN KUBO- En 1985, Kuba Esperanto-Asocio, PK 2018 La Habana 2, registris 1 400 membrojn. En 14 studcentroj funkciis esperanto-kursoj kun 1200 lernantoj kaj 65 instruistoj. Ekzistas teatra trupo "Nova Fonto". Historia parolado de Fidel Kastro, "La historio absolvos min" estis lasttempe publikigita en esperanto.

STRATOJ "ZAMENHOF" kaj "ESPERANTO"-

Ĝis nun 549 stratoj, monumentoj, k.t.p., en 33 landoj ricevis la nomon "Zamenhof" aŭ "Esperanto"... sen forgesi du asteroidojn, kiuj rondiras inter Marso kaj Jupitero, nomitaj "Zamenhof" kaj "Esperanto". Kaj en via urbo ?

ESPERANTISTAJ FLAŬRISTOJ-

Rondo de esperantistaj flaŭristoj celas organizi vizitojn al florriĉaj lokoj kaj kompletigi la nomenklaturon de sovaĝaj plantoj, kunlabore kun Prof. P. Neergaard. Inf. R.H. Bossong, Floraplein 28, NL-5644 JS Eindhoven.

NOVAJ ELDONAĴOJ-

- "Amo kaj Morto en Balio", romano de V. Baum, tradukita .

- "La Barbiro de Sevilla", de Beaumarchais. Speciala literatura numero de "Franca Esperantisto".

- "Bronza tigro", traduko de la historia dramo de la ĉina verkisto Guo Moruo.

- "Tero de la homoj", romano de Saint-Exupéry, tradukita el la franca. Bonvena sed...multekosta.

- "Baf !", kasedo stereofona. Dekdu kantoj de la italaj kanzonistoj Ĝanfranko, Gido, Marĉela.

- "Jubilea koncerto", disko 33 t/m de V. Damjanov. Kun tekstoj.

HANDIKAPITAJ ESPERANTISTOJ-

- La franca peranto de IAHE estas: M. Robert, entrée 10, 10 Bd. J. Duclos, 83130 La Garde.

la skulptita kaverno

Jen unue kelkaj vortoj pri la malkovro de la skulptita kaverno en Dénezé. En 1633, kiam la konstruaĵo kiu situas sur la alia flanko de la strato fariĝis parokestrejo, la parokestro malkovris sub sia loĝejo iun subteran vojjon, kiu kondukis lin al tiuj strangaj skulptaĵoj. Li malkovris plurajn skulptitajn ĉambrojn, kiuj ŝajnis al li herezaj kaj li preferis ŝtopi tiun vojjon. Okazis dua malkovro en 1740, kiam la dekanano de la kanonikoj en Doué-la-Fontaine, urbo apuda, vizitis la parokestrejon. En subtera parto li malkovris skulptitajn kapojn, kies aspekto estis antikva; kelkaj montris malfermitajn buŝojn. La vizitanto opiniis tiujn "kapojn" interesaj kaj li decidis kunporti ilin ĝis la arenoj de Doué, kie ili ornamas la lokon. Sed tiu translokigo neniam efektiviĝis kaj la cetero de la skulptaĵoj estis taksata obscena. Vere kelkaj personoj strange tenas la manojn; en la 18-a jarcento la kaverno estis juĝita "obscena pagana templo", oni faligis la volbon kaj ĉio estis kovrita per tero ĝis la ternivelo.

En 1876 Célestin Port, arkivisto en Angers, malkovris leteron de la parokestro al la episkopo, kiu informas lin pri la malkovro de pagana templo en la ĝardeno de la parokestrejo. Célestin Port imagas, ke temas pri antikva romia templo. Li iras surloke kaj remalfermas la subteran vojjon, kiu pasis sub la strato ĝis la piedo de ŝtuparo. La arkivisto vidis skulptitan grupon sed nenion pli ĉar muro ŝtopis la vojjon. En sia enciklopedio li nur notis la ekziston de skulptaĵoj de la 17-a jarcento.

En 1956 Jeanne kaj Camille Fraysse estis verkantaj libron pri la trogloditoj en Anĵuo. Ili serĉis informojn en la libro de C. Port kaj venis en Dénezé; sed tiam la subtera vojo estis tute ŝtopita. Ili estis devigataj iri malsupren per ŝtupetaro tra truo en la grundo. Ili trovis ĉambron, kiu tiam estis deponejo. Ili faris fotojn kaj sur unu el ili aperis skulptaĵoj kaŝitaj malantaŭ ĵetita tero. Tiu foto estas nun

dokumento ĉar tiu panelo estis grave difektita poste. En 1964 estis eldonita la libro de J. kaj C. Fraysse kaj la serĉantoj iniciatis fosadon sur la alia flanko de la eniro. Antaŭsentante la ekziston de aliaj skulptaĵoj ili petis oficialan protekton por la trovitaĵoj kaj la malkovrotaĵoj. Post procezo inter la komunumo kaj la posedanto de la tereno, post kromlaboroj por protekti la skulptaĵoj kontraŭ la malsekecon pluvan kaj grundan, la 3-an de julio 1982 la publiko povis viziti la kavernon.

La ĉefa problemoj estis respondi al la tri demandoj: kiu skulptis, kiam, kial? Fakte la respondoj estis liveritaj de la skulptaĵoj mem. Unue, homo sidas, kun stranga kapvesto, kvazaŭ el plumoj. Tio pensigas pri Indiano. En 1505 iu Blinot le Paulnier revenis de Brazilo kun kelkaj indianoj. Unu el tiuj, Esomerik, vivis apud Dénezé. En 1548 okazis "indiana festo" en Nantes okaze de vizito de la reĝo Henriko la Dua kaj de la reĝino Katerina de Medicis. Alia elemento por dati estas iu personaĵo, kiu portas plisitan kuloton ĝis la genuo kun triangula alkudrita peco. Tia vesto estis laŭmoda je la tempo de la reĝo Henriko la Dua, t.e. je la fino de la 15-a jarcento kaj ankaŭ dum la 16-a.

Ankaŭ montriĝas la malgrandan krispon tian, kia ĝi aperis je la fino de la italiaj militoj portita de Francisko la Unua. La tiamaj klaĉemuloj diris, ke tiu vesto ebligis al la reĝo kaŝi malbelan ŝankron de terura malsano, kiun la francoj nomis de Napola malsano, sed kiun ĉiuj aliaj tiam nomis la Francan malsanon. La krispo pli kaj pli grandiĝis. Tiu prezentita de la skulptaĵo estas tipa por la periodo de Katerina de Medicis. Ankaŭ la rubando, kiun surportas la personaĵo estas tre utila por la datigo. La 30-an de junio 1559 la franca reĝo Henriko la Dua mortis: okaze de turniro la lanco de lia skota gardisto glitis sub la viziero de la kasko kaj eniris tra la okulo en la kranion.

Katerina ankoraŭ ne havis sufiĉan tempon por preparigi vidvinajn vestojn, kiam Diana de Poitiers, la favorulino de la mortinta reĝo, kiu jam estis vidvino aperis ĉe la kortego vidvine vestita. La reĝino eksentis tre gravan humiligon kaj replike ŝi nur aldonis al la kufo, kiun ŝi kutimis porti, unu nigran veluran rubandon sur la frunto, klarigante, ke tiel indas al reĝino montri sian funebron. Post unu jaro kaj duono, kiam mortis Francisko la Dua, la nova reĝo, junulo kiu aĝis malpli ol 16 jaroj, tiam la patrino-reĝino anstataŭigis la rubandon de vidvino per nova kufo, kie fulardo el nigra silko ĉirkaŭvolvis la harojn, kufo kiun oni nomis "pinto" Medicis kaj kiun ŝi portis ĝis sia morto.

Alia detalo estas la tre kurioza dekoltaĵo de iu personaĵo. Ni ne eltrovis la modon pri nudaj mamoj. La tiama franca esprimo signifas proksimume: monstro de la brusto valeziana laŭ venecia modo (la tiamaj francaj reĝoj apartenis al la valezia familio). Tiu modo estis lanĉita de la sekvantinoj de la reĝino Katerina de Medicis en la somero de la jaro 1564; oni povas imagi, ke multe varmis ĉi tiun jaron! La damoj, kiuj timis malvarmumi metis bluzeton ĝis la kolo, kiel faris Diana de Poitiers, kaj iuj lasis vidi nur unu mamon.

Ankaŭ pri la muzikinstrumentoj oni povas fari interesajn rimarkojn. Ĉi tie estas diversaj tipoj de sakflutoj inter kiuj la malgranda sakfluteto kun longa ŝalmo kaj la "veze", kiu estas tipa regiona instrumento de la 15-a kaj 16-a jarcentoj. Ankaŭ estas la granda "bousine" (buzin) kara al Rabelais, kun granda ventro, longa ŝalmo kaj akompanata de la rekta hobojo. Iu homo portas iun mandolon, praulo de la mandolino kun tri kordoj, kiujn oni pinĉas.

Ni venu al la virino, kiu mamnutras infanon; oni divenas, en la suba parto de ŝia robo, la "vertugadins", tiujn vimenajn ringojn, kiujn oni metis ĉirkaŭ la robo por ŝajnigi ĝin grandege ronda. Tiu modo venis de Hispanio, per la hispana vorto "vertugados", kiu signifas: virtogardanto. Fakte, kiam oni dancis kun virinoj tiel vestitaj, oni restis je sufiĉe granda distanco de ŝia korpo. Sed bedaŭrinde tiu modo

postulis la plilarĝigon de la pordoj kaj ankaŭ de la foteloj. La nura avantaĝo aperas, kiam oni memoras, ke en la tiamaj kasteloj mankis la necesejoj, kaj ke tiam la virinoj ne portis subvestojn; tial, dank'al tia robo, pasante sur gazono, oni povis facile malembarasi sian korpon.

Ankaŭ pri ĉevalrajdado ekzistis problemo por la virinoj. Antaŭ la 16-a jarcento ili riskis ekskomunikon, kiam ili sin vestis laŭ vira maniero (Johana d'Arc spertis tion). Tial la tiamaj damoj rajdis per "sambu", malgranda fotelo transverse metita sur la dorso de la ĉevalo kaj la piedoj lokiĝis sur speciala apogilo. Sed tiu pozicio estis malkomforta, la ĉevaloj ne povis galopi kaj oni dresis ilin amble paŝi (la du samflankaj piedoj moviĝis samtempe). Se okazis neatendita bruo, pafo aŭ tondro, subite la ĉevaloj baŭmis, ekgalopis kaj la fotelo kun la virino estis forĵetitaj tiel, ke la virinoj falis kapantaŭen kun roboj levitaj super la kapo. Katerina de Medicis, kiu tre bone rajdis tre suferis pro la uzo de tia fotelo. Kiam ŝi estis nur 14-jara, ŝi falante rompis al si la genuon kaj poste lamis dum sia tuta vivo. Ŝi serĉis alian solvon kaj rajdis "à la planchette", t.e. kun unu piedo ĉe la piedingo flanke de la ĉevalo kaj la alia sur la selarkaĵo, apud la kolo de la ĉevalo. Tiu rajdmaniero ebligis la galopon de la ĉevalo, sed por eviti la efikon de la ventblovo en la roboj, la reĝino fabrikigis de siaj kudristinoj iun veston, kiun oni nomis kalsono. Tiu modo skandaligis tiel, ke la parlamento (juĝistaro) kunvenis por debati, ĉu la uzo de kalsono estas morala aŭ ne por la virinoj; kaj, ĉar ili ne akordiĝis ili apelaciis al la papo. Ankaŭ en la kortego la opinioj estis diversaj. Inter la apogantoj de la nova modo estis Brantôme kiu diris, ke "ĉiuj damoj de la kortego metas kalsonon kaj, pro koketeco ili havas silkajn kalsonojn, kies koloro kongruas kun tiu de iliaj subjupoj..."⁷

(fino en la venonta numero)

El dokumento trad. de F. Boyet

PAĜO DE LA GEKNABOJ

Ĉu mi plantos arbon en mia domo?

Nia katineto, Mitsi, kiun vi jam konas, tre ŝatas surgrimpi arbojn. Ŝi, do, tre ofte iras en la ĝardenon por tion fari. Ŝi elektas belan poplon, prefere kiam jam noktiĝas.

Sed nia amikineto ne kuraĝas reveni teren, kiam ŝi troviĝas sur alta branĉo. Tiam ŝi tre laŭte kaj korŝire plendas, kaj vokas nin, por ke ni iru, kunprenante la plej altan ŝtupetaron, por ŝin savi...

La lastajn tri fojojn, tio okazis nokte kaj sub pluvo. Ĉiufoje mia patro koleras kontraŭ tiu malsaĝa besteto...sed feliĉe li fine konsentas iri por preni ŝin el la arbo, dirante: "Estas la lasta fojo! La venontan, mi lasos ŝin... Des pli malbone!"

Estus eble pli amuze por la katineto - kaj malpli malagrabla por mia patro - se ni plantus arbon en la domo mem! Ĉu ne?

Oliviero, Boën, Francio.

Saluton, geamikoj!

En la lasta numero mi petis, ke vi skribu kelkajn frazojn pri tio, kion vi faris dum la pasintsomera feriado. Venis du respondoj, ambaŭ el Pau, Francio, ambaŭ de knaboj.

Koran dankon al ambaŭ.

André

En Francio:

Dum la somera libertempo mi iris en Bretonion, en Finistero, apud Brest. Kun miaj kuzoj, ni banis nin kaj ludis futbalon. Mi bone amuziĝis. Gaetano.

(Gaetano estas 12-jara knabo, ano de la Esperanto-Klubo de Kolegio Jeanne d'Albret, en Pau, Francio.)

En Germanio:

Dum mia ferio, mi iris al Aŭgsburgo por la Universala Internacia Infana Kongreseto. Mi havis multe da aktivajoj, ekzemple: ekskurso en la zoologia parko. Ni ludis en la kongresejo bilardon kaj tiel plu. Tiu Infana Kongreseto estas mia dua kongreseto. Ĝi multe plaĉis al mi.

David, grezijonano el Pau.

LA INFANKONGRESETO, AŬGSBURGO, 1985



- Kiom da viaj konatoj vi rekonas ?


- Ĉu vi povas diveni de kiom da landoj devenas la kongresanoj ?



LEONARDO DA VINCI

La Geniulo de l'Renesanco

Leonardo kaj la milito- post la disfalo de l'regno de la dinastio de l'Staŭfer, en la 13-a jarcento, formiĝis en Italio aro da malgrandaj urbaj ŝtatoj, kiuj senĉese milite rivalis unu kontraŭ alia. Krome, je l'turno de l'15-a al la 16-a jarcento okazis konstantaj militiroj inter la potencoj Francio, Napolo, Milano, Venecio kaj la Vatikana Regno sur itala teritorio. Tio kaŭzis, ke ĉiuj tiuj ŝtatoj kaj urbo-ŝtatoj sin sentis devigataj teni siajn armilojn, ĉu atakaj ĉu defendaj, ĉiam sur plej alta teknika nivelo; des pli, ĉar la novaj pulvo-armiloj rapide evoluiĝis. Estis urĝe bezonataj arkitektoj, teknikistoj, sed ne pro siaj artaj kvalitoj sed ekskluzive pro siaj teknikaj konoj. Kaj Leonardo? Laŭkaraktero li estis pacema homo, artisto. Li skribis: "Milito estas besta frenezo!"



Esploroj pri haŭbizoj kaj
kanonoj

Tamen, eĉ per tio li ŝajnas anticipi multajn sciencistojn de l'20-a jarcento; abomeni militon kaj tamen servi al ĝi per inventoj! La dimensioj de liaj elpensoj ĉi-rilataj estas senspirigaj. Kiel sciencisto li evoluigis ideojn, kiuj en sia aŭdaco kaj fantazio estas unikaj. La elpensitaj armiloj de Leonardo estas signoj de l'epoko en kiu li vivis: estis transira epoko de arbalestaj soldatoj kaj rajdistoj al fuzilieroj kaj kanonistoj. Ĝis la perfektigo de la kanono, la ĉefarmilo de la artilerio estis la katapulto. Leonardo projektis tiajn ĵetmaŝinojn, i.a. en formo de giganta arbalesto. Soldato staranta apud ĝi ŝajnas proporcie esti nano. Sed konata desegnaĵo priskribas, en viva maniero kaj majstralerteco, la grandajn malfacilaĵojn en muntado de kanono. Krom la muskola forto de tuta aro da viroj oni disponis en jena epoko pri kruda mekanisma ilaro. Tre interesas ĉefe la majstra desegnaĵo prezentado. Ĝi montras, ke nudaj viroj ŝovas grandan afuston sub la kanonon, dum aliaj penas pri la gruo, por levi la kanonon. Estas konsolo, ke neniu el la armiloj projektitaj fare de Leonardo, efektive estas konstruita; ili restis projektoj. Evidente ili tiom anticipis la teknikajn eblecojn de sia epoko, tiel ke ili estis tro komplikaj por esti konstruitaj. Supoze, pri tio Leonardo eĉ konsciiĝis. Estas raportite fare de samtempuloj, ke Leonardo estis bonfara viro, ke li estis vegetarano kaj ke li ekzemple aĉetis de birdovendistoj sur la merkato korbbon da birdoj por redoni al ili la liberecon. Apenaŭ imageble, ke tia homo sopiris al teruraj armiloj. Sed la senlima teknika fantazio havis sian sferon kaj kampon de teoria aktiveco. Ankaŭ "vera" tanko projektita fare de Leonardo neniam ekveturis. Fakte ja estas mirige, ke la mondo konatiĝis multe pli poste kun tankoj, en 1917.

Duoblaj Ŝtuparoj- Laŭ la priskriboj de Leonardo temas pri Ŝtuparoj destinitaj por fortikaĵoj kaj citadeloj pro strategiaj kaŭzoj. "Unu Ŝtuparo por la kastelestro, la alia por la soldatoj", oni povas legi sur skizo en itala lingvo. Nu, unu tia duobla Ŝtuparo efektive estas konstruita, nome en la pompa kastelo Chambord, ĉe la Loire; ĝi apartenis al reĝo Francisko 1-a, kies gasto Leonardo

ja estis dum siaj lastaj jaroj. Grandiozaj festoj ĉi tie okazis. Inter 70 Ŝtuparetoj, kiuj formas erarigan labirinton, la duobla Ŝtuparo estas la plej fama. Tiu arkitektura majstra verko sekvis tute paceman strategion: neniu amanta paro, dum la galantaj vesperaj festoj, nevole renkontiĝu en la Ŝtuparejo kun aliaj, kiuj povus ĝeni aŭ ĝin ekkoni, en tiu labirinto por geamantoj.

La flugado- revo de l'homoj de post mitaj epokoj... Ni memoru pri la helena arkitekto Dedalo de la Labirinto en Kreto kaj pri ties filo Ikaro... Sennombraj, de post tiu klasika legendo, estas la provoj de l'Homo, feliĉe sin levi en la aeron, kiel la birdoj. Dum Kristoforo Kolumbo malkovras Novan Mondon, Ameriko, Leonardo estis fascinata pri tiu revo: flugi. Dum plenaj 25 jaroj li atente observis milfoje la birdojn dum ilia flugado, li meditiis, projektis kaj konstruis diversajn tipojn laŭ diversaj teknikaj konceptoj. Ekzistas ekz. kelkaj projektoj ĉe kiuj la fluganto ritme alterne movu la kruojn kaj brakojn, por funkciigi la flugilojn. Sed ĉiuj ideoj de Leonardo baziĝas sur la erara koncepto, ke la forto de la homaj muskoloj sufiĉas por imiti la birdojn; pro tio li neniam flugis. Restis vanaj ĉiuj tiaj projektoj kaj provoj. Nur 400 jarojn poste homo sukcesis flugi laŭ similaj konceptoj: Otto Lilienthal en Berlino. Ankaŭ pri sistemo de helikoptero Leonardo okupiĝis. Ekzistas admirinda desegna prezentaĵo, laŭ kiu li verŝajne eĉ konstruis funkciintan modelon. Sed nuntempe, ni scias, ke la rotoraj helicoj laŭ koncepto de Leonardo, por vera praktikado estis ja taŭgaj por akvo, sed por aero tute nesufiĉaj. Aliflanke, laŭdire, Leonardo, nerekte tamen grave, kontribuis al la evoluo de l'moderna helikoptero, ĉar al ties inventinto, Igor Sikorsky, kiam li estis infano, lia patrino estis montrinta iun tagon ĉi-rilatan desegnaĵon de Leonardo. Pro tio Sikorsky poste, kiel inĝeniero, fariĝis grava pioniro en la evoluo de l'helikoptero. Krome, ekzistas tre bona projekto pri paraŝuto en formo de piramido. Interese denove estas, ke Leonardo jam tute klare konsciis pri la fizika natura ebleco en sekura uzo de tia aparato. Tamen daŭris ankoraŭ 300 jarojn, ĝis en

1797, homo riskis unufoje eksalton teren pere de paraŝuto.

Leonardo la pentristo- Rilate al la desegna kaj pentra artoj Leonardo havis en la geniaj pentristoj, skulptistoj kaj arkitektoj Mikel-Anĝelo kaj Rafaelo, samtempe vivintaj, gravajn konkurantojn. Pro tio, por Leonardo, ekzistis nur unu celo: artan perfektecon kaj originalecon, kiel eble plej proksimaj al la naturo. Tiel Leonardo fariĝis majstro en prezento de nudaj figuroj, korpoj, kiuj evidentiĝas eĉ la ludadon de ĉiu unuopa muskolo. Eĉ pli: laŭ interna impulso, li klopodis trovi, transe de l'nura observado, malantaŭ la gestoj kaj vizaĝoj de l'homoj, ties animojn kaj ties reale efikajn vivoprincipojn, por ke li fariĝu eĉ pli bona pentristo. Konsekvence, por konatiĝi kun la muskoloj sub la haŭto kaj kun la funkcioj de l'tuta korpo, Leonardo partoprenis ĉirkaŭ 30 anatomiajn kunsidojn. Ja, sekrete, dumnokte en Florenco, li eĉ mem dissekciis ripete en kadavro-deponejo, kvankam li riskis pro tio punon de morto. Unikaj kaj ekscitigaj tiam, en la medicino, estis liaj anatomiaj sekco-desegnoj, ekz. pri infano en la utero, aŭ pri la intestoj de l'homo, aŭ pri la diversaj sango-vazoj. Tiel do Leonardo fariĝis natursciencisto kaj anatomisto. Pere de kadavroj li nudigis kaj malkovris la mekanikon de l'ŝultra artikolo, studis la muskolaron de l'kolo, ĉiam serĉante la kaŝajn sekretojn de l'naturo. En la denta medicino Leonardo priskribis kiel la unua, anatomie precize, la makzelan sinuson, kio estis bazo por gravaj ekkonoj ĉi-rilataj en la 16-a jarcento.

Por pentraĵo "Adorado al la Preĝoj", Leonardo faris multajn desegnaĵojn, i.a. pri galopantaj ĉevaloj. Sed unu folio estas krome interesa ekzemplo pri la tiam tute nova desegna kaj pentra fenomeno de la perspektivo, en kies analizo kaj prezento Leonardo estis majstro, samtempe kun sia germana artista kolego Albrecht Dürer. Atente, en tiu studo, Leonardo plilongigas la perspektivajn liniojn ĝis en unu komuna centra punkto. Alia folio entenas studojn por projektitaj bronzaĵaj rajdistaj monumentoj. Krome, la folio entenas ne nur skizojn pri ĉevalaj kapoj; ni vidas i.a.

kapon de leono kaj grimacan vizaĝon de viro. Tio lasta evidente estas unu el la multaj preparaj studoj por projektita giganta pentraĵo, nomita "Batala de Aughiari". Ni sentas pere de ĝi la hororon kaj abomenon, kiun reprezentas tiu konglomeraĵo el perforto kaj furiozo; ni perceptas, anime, la koleregon, kiu alfrontiĝas minace el la grimacaj vizaĝoj de la batalantoj; ni perceptas la ekstreman tension kaj la suferojn de la interbatalantaj kreaĵoj; ĉio-ĉi, laŭ arta vidpunkto, estas prezentita en certe nesuperebla maniero. Estas evidente, ke tia verko, eĉ de Leonardo, povas esti nur la rezulto de plej detalaj, abundaj studoj, plej precizaj ĝis en ĉiuj detaloj.

Finonte, ni revenu spirite al la kastelo de Amboise, kie Leonardo pasigis ja siajn lastajn jarojn. Iom, jam resume, ni povas konstati, ke Leonardo da Vinci estis efektive universala geniulo, homo, kies esploraj ideoj fakte ne konis limojn. En unu persono li ja estis i.a.: esploristo, inventisto, teknikisto kaj inĝeniero, natursciencisto, artisto, anatomisto, arkitekto, muzikinstruisto kaj virtuoza, skulptisto, alttalenta desegnisto, astronomo. La notoj en la notlibroj de Leonardo ampleksas ĉirkaŭ 7000 paĝojn. Do nur supraĵa traktado estas ebla ĉi-maniere. Multaj el liaj ideoj kaj desegnitaj projektoj estis realigitaj en postaj jarcentoj, kiel ekzemple la prempumpilo la mergokloŝo, la tornstablo kaj, kiel jam menciite, la biciklo, la transmisia ĉeno, la milita tanko, la paraŝuto k.m.a. Diversloke oni faris poste kaj prezentas funkciajn modelojn laŭ liaj desegnitaj projektoj, i.a. ĝuste kvazaŭ en nia "najbareco", en la muzeo Clos-Lucé ĉe la kastelo de Amboise.

Memortabulo registras lian vivon, 67-jaran. Tie ankaŭ, tutproksime, en la kapelo "Sankta Huberto" Leonardo ripozas por eterne. Sed, Leonardo spirite plu vivas speciale per siaj plej grandiozaj verkoj, nome per tiuj de la pentra arto, kvankam nur kelkaj el ili restis konservitaj tra la jarcentoj. "La Anĝela Anonco" troviĝas en la "Uficioj" en Florenco. Estas frua verko de l'majstro. Pli poste lia pentra tekniko pli kaj pli delikatiĝas. Tipa trajto jam

estas la aperteco al naturalisma fono. Pentraĵo "Leda kun la Cigno" estas bona kopio de la ne konservita originalo. Leda estas, kiel konate, en la greka mitologio, la amatino de Zeŭso, kiu proksimiĝas amindume al ŝi en formo de cigno. La fama "Sankta Manĝo" en Milano estas fresko, do pentrita rekte sur la muron. Pro tiu riska teknika maniero bedaŭrinde ĝi grave difektiĝis. La gestoj kaj sinteno de la disĉiploj montras la emociajn reagojn post la eldiro de Jesuo: "Unu el vi min perfidos!" Estas kvar grupoj en la komponaĵo; 24 parolantaj manoj. En tiu tumulto de l'sentoj, Jesuo restas la trankvila centro de la sceno. "La Madono en la Roka Groto", destinita origine por ĉefaltaro en Milano, pendas en Louvre. La perspektivo gvidas la rigardon en profundan fonon. Harmonia sceno en delikata lumo. Dua varianta, samtitola, estas videbla en la "Nacia Galerio", Londono. Alteco de l'pentraĵo: preskaŭ 2 m. Estas rafinita ludo inter lumoj kaj ombroj, kiu regas la scenon. Certe oni vidis neniam ajn, en la pentra arto, pli eterajn, diecajn mienojn, pli delikatan komponon inter lumoj kaj ombroj. La pentraĵo "Sankta Ana", videbla en Louvre en Parizo, montras, ke kvar figuroj interplektiĝas en unu harmonian grupon, laŭ sinteno, laŭ la rigardoj kaj gestoj. La dolĉeco, gracio kaj ĉarmo de la prezentaĵo, ankaŭ la mistikeco en la mienoj de patrino Ana, profunde memorigas al similaj impresoj, kiuj elradias el alia pentraĵo, la plej fama pentraĵo en la mondo: la "Mona Lisa" aŭ "La Gioconda",

videbla en la muzeo Louvre en Parizo. Tiu pentraĵo estas asekurita ĉe Lloyds en Londono pri la sumo de 120 milionoj da germanaj markoj, do ĉ. 360 000 000 francaj Frankoj. Milionojn kaj milionojn da homoj tiu verko jam ensorĉis. 20 jarojn, laŭdire, Leonardo laboris pri ĝi. Iam ĝi estis propraĵo de Reĝo Francisko 1-a de Francujo, la amiko kaj gastiganto de Leonardo. Sennombraj artistoj, post Leonardo, klopodis imiti la enigman impreson de tiu vuala moleco, kiu karakterizas tiun unikan verkon, tiun spire delikatan diafanecon, kiu ĝin tegas; sed neniam artisto refoje poste atingis ion similan, eĉ ne proksimume.

francaj poetoj

de la

XVII.a Jarcénto

PRO KISA EKSTAZO (Tristan l'Hermite)

Mortiĝa dum momento, redonis ci la spiron,
Ho kiso - ĝis la koro mildadas la ektuŝo -
Naskito ĉarmoplana de senkompara buŝo
Taksanta por verdikto la aman eksopiron.

Sed sangoflu' haltiĝas kaj febrosku' anhela
Forprenas vivkoloron, nuligas prudentemon.
Ĉieloj! Mi ja trinkis el lipo ĉi plej bela
Nektaron la ĉielan, mortigan la venenon.

Forflugas la animo sub tia ĝojoondo.
Ĉi savgarantiaĵo min sendas al transmondo.
Jam troas! Jen finite! Eliza, mi mortiĝas!

Ĉi kiso mian vivon ŝlosfermas per sigelo.
Samkiel la serpento sub floroj renkontiĝas,
Mi trovis mian morton sur rozburĝona belo.

AMSOPIRA MALESPERO (Theophile de Viau)

For de l'okuloj viaj, de mia koro gardaj,
Nur hantas min la sento de kruda malfavoro.
Sen iom da espero en amrebriloj ardaĵ,
Estintus la forpaso tutlasta la doloro.

Dum flamas mia sango, katenoj por l'animo,
Nenies malfeliĉo rezultis eĉ egala.
Serpentoj enanime, vulturoj ĉe la sino,
Kaj estas viaj sagoj ŝirvundo pli fatala.

En mia nuna stato, dum pezaj zorgoj tedas,
La saĝo min forlasas, mi perdas la prudenton;
Kaj pensojn ĉiaspecajn l'animo flankenĵetas,
Pri ci rememoranta dum trompas ci l'atendon.



PERFIDO (François Maynard)

La perfido de l'belulino,
Kiun amis koro de mi
Igas koron ami nenion
Krom malamo terura al ŝi.

L'am' ĵurita al logoplana
Aliiĝis al malestim':
Kor' malamas sin, ĉar neblas
La forges' de l'amoinklin'.

EPIGRAMO (Claude Malleville)

Kiam Johano, pro granda amemo
Nomis l'edzinon duono de l'memo,
Ŝajnas al mi, ke li estas bonkora,
Ĉar se la dorm' senprokraste lin tenas
Kaj anstataŭas kunulo samhora,
Ŝi nur duone al li apartenas.

EPITAFIO DE BONA EDZO (Isaac de Benserade)

Ĉi tie kuŝas edzo ekzemplon doni taŭga;
Bonkora, pacienca, transvive grandmerita.

Kvankam lia viv' maldaŭra
Daŭre estas li kokrita.

Poemoj tradukitaj de S. BONIOL

LA KOKO KRIIS

JE LA TRIA FOJO

Ĉu vi konas nian kulturdomon Grésillon, tiun puran amindaĵon en la tiel nomata "ĝardeno de Francio"? Ĉu birdofluga fotoĵo en gazeto alŝovis sub viajn okulojn pintajn turetojn ardezo-tegitajn meze de verdo plurnuanca? Ĉu io romantikeca ekvibris viakore ĉe vido de eleganta fasado alterne brikkolora kaj helŝtona, en muara lageto respeguliĝanta? Ne mirige, ke tiakadre la vivsorto difinis rendezuon por neofta okazaĵo.

Kie do? Ĉu sur la insuleto post la azendorsa lignoponteto ĉe nazsonado anasa aŭ flutado bufa? Ĉu subombre de la tilio antaŭkastela, kies eniĝema parfumo dislasas efluvojn kapturnajn? Ĉu sublaŭbe en arbareto apuda, kie vespere grincas griloj? Ĉu sur la ĉefa aleo parka, post sunsubiro, kiam sturna bando, supere en korpoĉe-korpa denseco traflugas la bienon kaj abrupte ŝtonfalas teren, unuamase, kaŝite de arba kurteno? Kie do? Ie; ie ajn; kaj cetere ne pridemandu la eventualajn kunestintojn: ili ne kapablas respondi; ĉar povas esti, ke la tiel nomata "okazaĵo" ne okazis en palpebla realo vera, sed en pensebla realo reva. Mi petas vin, ne ŝtelridu eĉ indulge: tialoke homoj kaj naturaĵoj kvazaŭ aliancas por estigi universon revan, kie oni ŝvebas repurigite post tro realecaj realaĵoj.

Mi certas nur pri tio, ke mi estis freŝdata esperantistino, kiu la unuan fojon ekrilatis kun eksterlandanoj pere de nia lingvo. Pro tio mi ektimetis, interalie pro mia malbelsona - tutsincere mi diru: parize kartava - prononcmankado. Jen plej afable alparolis min samideano je kelkaj jaroj pli aĝa ol mi. Ĉe la unua frazo lia mi ekpensis, ke Franco li ja ne estas kaj mi konfuziĝis. Tamen tia li estis kaj eksciinte mi konfuziĝis plue... Ni estis kunbabilantaj jam de momenteto, kiam li hazarde prialudis la nordan regionon de Francio, kie mi pasigis miajn unuajn dek vivjarojn.

"Ĉu vere? En kiu urbo vi loĝis, estimata samregionano?" - "En la urbo Cambrai." - "Nekredeble! Tie mi naskiĝis; tie mia patro instruadis en gimnazio dum dudek jaroj." - "Via patro, ĉu? Sed supozeble mi

lernis sub li. Kiu estis lia fako?" - "La lingvoj greka kaj latina; beletristiko entute. Li respondecis pri la abiturientoj." - "La "pedik-barbulo"! Dio gardu! Jen la moknomo, per kiu ni bubaĉe titolis lin. Ho! Kara samideano, ne ofendiĝu! Post tiom da jaroj, ĉu mi kuraĝu konfesi al vi per kiaj malsaĝaĵoj ni miskondutis al tiel estiminda homo?" - "Diru nur..." - "Konsentite. Imagu, ke iun belan tagon okaze de komentario pri plaŭta aŭ terencia komedio (la detalo forvaponiĝis), via avangardema patro instigis nin aktori en la latina. Iam koko estis enscenigota. Iu sentaŭgulo el nia bandaĉo prenis sur sin ŝtelŝovi veran flugilhavulon en la klasĉambron. Komence ĝi silentis mirstultigite; sed en la momento, kiam via patro laŭtleĝis la koncernan scenon por stampi en niaj longaj oreloj la ĝustan paroltonon, la rekonsciiĝinta fiulo plenpulme kokerikadis meze de rido eksploda, de ridego nebridebla Dekokjaruloj ja estis ni senkompataj kaj senhontaj!" - "Fakte kvankam mi estis nur knabineto mi memoras, ke Paĉjo rakontis la okazintaĵon ĉe la familia tablo; lia profesia digno altrudis al li rigidan mienon kontraŭ la petolema lernantaro sed hejme li ridis el la tuta koro, admonante min tamen pli dece kondukti por ke mi ne kulpu pri lia senhonorigo" - "Ĉu tiu klerulo ankaŭ interesiĝis pri Esperanto?" - "Nur preterkure. Dum li studentis li lernis la lingvon en la daŭro de tri semajnoj kaj entuziasmiĝis pri ties strukturo; tial, ke tre frue la ideo pri Esperanto enviciĝis miakapete inter ŝatindajn elpenaĵojn homajn. Paĉjo do studis ĝin libere sed la italan lingvon uzis tute libere. Junaĝe mi aŭdis lin, dum li laŭtleĝis - pli ĝuste diri: vivigis - la poemaron "Floretoj" de Sankta Franĉjo el Asizo." - "Asizo! Jen prestiĝa nomo orelokaresa. En la jaro 1948-a mi restadis tie dum kvarono da jaro por pristudi surloke la artaĵojn en bazilikoj malsupra kaj supra (tiam mi estis laboreganta super tezo malfacila). Malsupre en mallumega mistera mezepoka etoso mi meditadis antaŭ la naivaj iom praaĵ pentraĵoj de la primitivuloj; mi vagadis en malnovepoka bildaro; mi surgenuiĝis ĉe malhele vestitaj virgulinoj rigidmienaj; mi adaptiĝis en universo kvazaŭ stompita internen

alrigardanta, kie la koloroj mutis. Kaj supre jen la eksplodo luma, jen la eksplodo freŝkolora, jen la ŝoko ĝojoporta pro tio, ke la plurjarcentaj farboj neniel paliĝis, neniel difektiĝis kvankam en lumo baniĝantaj. La unuan fojon, kiam mi trafis la tutan freskan scenaron de Giotto konceptitan kaj kreitan antaŭ ses jarcentoj, mi haltis senspira surloke alforĝita post tia skuo spirita kaj sensa, kian ne povas imagi al si tiu, kiu ne travivis la senperan sperton." - " Mi plene akordas kun vi ĉar la senperan sperton travivis ankaŭ mi en tiu sama jaro 1948-a. Mia patro alsendis min al la universitato por eksterlandanoj en Peruĝo kaj mi profitis la okazon de tritaga veturo al Asizo. Efektive tia kontakto senpera, tia skuo post abrupta stil- kaj lumkontrasto nepre ŝanĝas ion en la sentmaniero de la travivinto." - " Strange tamen, ke okazaĵo hazarda ree proksimigis nin, kaj poste pasadis tridek jaroj pluaj antaŭ ol ni interkonatiĝis" - " Via ĵus elvokita gloraĵo koka rememorigas min pri tio, ke en la monafinejo, kie mi tranoktis dufoje (dekstre de la baziliko en apuda strateto), perfida kokerikanto distrumpetis eĉ antaŭ la matenruĝo kaj senigis min je bezonata dormo post nokto mallonga." - " Mia Dio!

Ankaŭ mi loĝis apud la baziliko en tre malnova senkomforta dometo, kiu mirinde kunhelpis gardi la etoson necesan por mia laboro. Kaj ŝajnas al mi, ke la malbenita tenorulo vekis la tutan kvartalon... Ankaŭ min ĝi senigis je bezonata dormo kaj tiel incitis min, ke sur tia sanktega loko mi ne povis min deteni de enpena sakrado ĉiumatena. Ĉu vi tutkorpe ĝuadis la velurbluajn noktojn tieajn, dum senmateria venteto tuŝkaresas la cipresajn branĉojn majeste profiliĝantajn laŭvoje? Rezultas neeble, absolute neeble rehejmeniĝi, neeble labori; neeble alion fari, ol mergiĝi en eksterteran etoson, iel senpezigitan, nenie ajn ĝueblan." - " Nenie ajn. Vi forprenis la vortojn de sur mia lango..."

Ĉe tiu kunĉenado rememora, kvazaŭa kompliceo en sentemo tutsimila naskis silenton, kiu regadus plu se malbenita flugilhava distrumpetanto ne kokerikus tute malkonvene.

Jen la koko kriis je la tria fojo.

Simone Boniol

RAKONTETO

Dum monduma kunveno, sinjorino insiste parolas, dum duonhoru, al kuracisto pri siaj malsanoj, la kuraciloj, kiujn ŝi uzas, ktp. La kuracisto, tediĝinta, alparolas advokaton, kiu sidas apud li:

" Mi petas, sinjoro. Dum duonhoru, tiu sinjorino faras al mi demandojn pri sia sano. Ĉu mi rajtas peti de ŝi honorarion?"

" Kompreneble, vi rajtas. Tute normala peto. koncerne min, vi ŝuldas al mi 500 frankojn."

PROVERBO

Se juneco estus sperta,
Se maljuneco estus lerta!




POR VIA DISTRO

SOLVO de la ANTAŬA ENIGMO

Nomo de la aŭtoro kaj titolo de la verko

KRUCVORTA ENIGMO



HORIZONTALE: 1. Batlaborilo. — 4. Manĝeŝiranta. — 7. Manĝata molusko — 8. Bongusta riverfiŝo. — 9. Respektegi kiel dion. — 10. Longkrura marĉa birdo. — 15. Arme okulsigni. — 16. Malokcidenta. — 17. Homarplimultiganta birdo. — 19. Fari gazeton. — 22. Jetludilo. — 24. Lerneja skribilo. — 25. Vivĉesi. — 26. Turne movadi fluidaĵon. — 27. Pago al la ŝtato. — 28. Granda regno.

VERTIKALE: 1. Superversto. — 2. Ronda kuko. — 3. Atente rigardadi. — 4. Blubera kreskaĵo. — 5. Ne povanta aŭdi. — 6. Malnovtempa. — 11. Paneto. — 12. Fermita mano. — 13. Flugbesto. — 14. Senkompara. — 17. Rondire moviĝi. — 18. Armea ranghavo. — 19. Kolekti la fruktojn. — 20. Butontrua rekonilo. — 21. Plej malgranda materiero. — 23. Maltage.

Oni skribu la solvon prefere en la formo de listo. — Inter la solvintoj estos dislotataj libropremioj en la valoroj de 20, 15 kaj 10 steloj. — La solvoj estos akceptataj ĝis la fino de novembro. — Ne forgesu plenumi la konkursajn regulojn!

16	154	67	97	27	146	145
J	E	J	U	R	I	S
113	153	52	99	7	177	
O	P	R	E	S	I	
110	11	172	73	120	29	
H	I	E	A	U		
151	162	44	62	19	155	178
N	E	K	L	A	R	A
91	128	24	96	117	59	
F	L	A	S	K	O	
126	6	38	132	161	75	174
R	A	K	O	N	T	I
115	23	49	166	176	35	
A	M	L	O			
105	76	25	164	85	64	150
N	E	L	O	N	G	E
4	123	89	14	78	122	
C	E	N	T	I	M	
56	124	40	140	20	101	66
I	M	P	O	Z	I	S
158	149	80	34	103	3	171
S	L	A	V	I	S	M
12	127	112	168	90	55	45
L	A	M	P	E	T	O
65	160	81	53	18	70	48
A	S	P	I	K	O	J
94	170	63	10	143	93	104
G	R	I	M	A	C	O
119	43	131	95	22	159	107
R	I	M	E	S	O	J
130	2	26	36	68	114	106
Z	N	G	L	U	J	O
116	169	30	175	86	139	50
N	E	C	A	S	T	A
88	32	141	82	128	142	157
D	E	N	A	K	K	E
47	167	152	163	173	21	
A	S	E	P	S	A	
8	92	1	146	69	74	57
K	O	M	P	R	E	S
41	134	147	54	133	31	
A	D	M	O	I	I	
79	109	121	60	84	135	39
L	A	U	N	O	M	E
108	15	58	136	72	13	
D	O	M	I	N	I	
93	138	33	46	9	100	118
R	I	S	K	E	M	O
37	102	5	165	125	71	
O	L	I	V	O	J	
42	87	179	17	77	156	
N	E	N	I	O	M	
111	98	61	137	54	28	144
D	K	U	L	T	A	J

1P	2L	3H	4G	5U	6E	7S	8P	9T	10J	11C	12I	13S	14G	15B	16A	17U	18K	19C	20H	21O	22K		
M	I	S	C	A	A	S	K	E	M	I	L	L	T	O	J	U	J	A	Z	A	S		
23F	24D	25G	26L	27A	28V	29C	30M	31R	32N	33T	34N	35F	36L	37U	38E	39S	40H	41R	42U	43K	44C	45I	
M	A	L	G	R	A	C	C	I	E	S	V	O	L	O	K	S	P	A	N	I	K	O	
46T	47D	48J	49P	50M	51V	52B	53J	54R	55I	56H	57P	58B	59D	60S	61V	62E	63J	64G	65J	66H	67A	68L	
K	A	J		P	A	T	R	I	O	T	I	S	M	O	N	U	L	I	G	A	S	J	U
69P	70J	71U	72E	73C	74P	75E	76G	77U	78K	79L	80B	81J	82N	83S	84S	85G	86M	87D	88N	89G	90I	91E	
R	O	J		R	E	T	E	N	I		A	A	P	A	C	O	N	S	E	D	N	E	
91D	92P	93T	94J	95K	96D	97A	98V	99S	100T	101M	102U	103P	104J	105G	106L	107H	108S	109S	110C	111V	112I	113M	
F	O	R	G	E	S	U	K	E	M	I	L	I	O	N	O	J	D	A	H	O	M		
113B	114L	115F	116M	117D	118P	119K	120C	121S	122G	123G	124H	125U	126R	127I	128A	129R	130L	131K	132E	133R	134K	135S	
O	J	A	N	K	O	R	A	U	M	E	M	O	A	S	L	A	M	O	N	D	M		
136S	137V	138T	139M	140A	141U	142N	143S	144V	145A	146A	147R	148P	149H	150E	151C	152O	153B	154A	155C	156G	157H	158W	
I	L	I	T	O	N	K	A	J	S	I	M	P	L	E	N	E	P	E	R	M	E	S	
159K	160S	161E	162C	163D	164G	165U	166F	167D	168I	169M	170J	171H	172C	173O	174E	175M	176F	177B	178E	179I	180N		
O	S	N	E	P	O	V	O	S	P	E	R	M	E	S	I	A	L	I	A	N			

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Quand vous recevrez ce numéro de Kulturaj Kajeroj, sera proche le 20ème anniversaire du décès de Henri MICARD, un homme qui, comme tous les hommes de progrès, situait sa pensée dans l'avenir. Mais il ne se contentait pas de concevoir des situations qui permettaient de se placer dans l'avenir. Il les mettait en oeuvre et il en guidait les premiers pas. Concernant Grésillon il a su décider alors que beaucoup d'amis hésitaient. Il a su semer une graine d'avenir. Il a su l'entourer de ses soins, aidé par le dévouement de madame Micard. Il a su donner à d'autres le goût de ce qui était au départ une aventure Et la plante aventureuse a poussé pour atteindre en 1986 ses trente-cinq ans d'existence, sa maturité sage après ses années de jeunesse. Maturité trop sage peut-être, mais maturité assez solide pour lui permettre de tenir tête aux circonstances parfois défavorables et de continuer de croître. Croissance un peu retardée par le manque de "jardiniers". Un espoir pointé. Heureusement car un manque de soins risquerait d'amener la MCE à un vieillissement précoce.

Vous tous pouvez aider la MCE à poursuivre sa croissance. Venez nombreux, encore plus nombreux, assister aux stages que nous organisons. Pour cette année les inscriptions arrivent comme les années précédentes, malgré un ralentissement en février. Juin s'annonce meilleur que l'an dernier. Les premières semaines de Juillet ressembleront probablement à celles de l'an dernier. Pour le reste de l'été il est difficile de faire déjà le point. Une modification est intervenue dans le programme: la rencontre "voyants-non voyants" ne pourra pas avoir lieu cette année. Par contre pendant la dernière semaine d'Août se réuniront, sous l'égide de JEFO, de jeunes allemands et français pour leur 4-ème rencontre.

La neige, très abondante cette année, a fait des dégâts à Grésillon. Tout ne sera sans doute pas en état au printemps, mais en juin.

***** INTER NI *****

Kiam vi legos tiun numeron de la revuo alproksimiĝos la 20-a datreveno de la forpaso de Henri MICARD, viro, kiu, kiel ĉiu progresema homo, situis siajn pensojn en la estonteco. Sed li ne nur konceptis iun estontecon; li ankaŭ prilaboris la vojon al tiu estonteco. Koncerne Grésillon, li decidis, kiam multaj geamikoj hezitis. Li kuraĝis semi. Li prizorgis la semon kaj la junan planton, kun la sindonema helpo de S-ino Miard. Li sukcesis doni al aliaj la deziron partopreni en tiu aventuro. Kaj la planto kreskis ĝis, en 1986, sia tridek kvina jaro, matureca aĝo. Eble tro tradiciema matureco, sed sufiĉe firma por ebligi la planton fronti la kelkfoje kontraŭajn cirkonstancojn. Ĝi daŭre kreskas, eble ne tre rapide, pro ĝia matureco kaj ankaŭ pro la manko de prizorgantoj. Ni esperu, ke tiu manko ne kondukos ĝin al tro frua maljuneco. Ĉiuj el vi povas helpi la Esperanto-Domon. Venu ankoraŭ pli multaj ĉeesti niajn aranĝojn. Ĉi-jare Julio multe similas la antaŭjarajn koncerne la aliĝojn. Pri la cetero de la somero estas ankoraŭ tro frue paroli pri la amplekso de la partopreno. Ŝanĝo okazis en la programo: la renkonto de blindaj kaj vidpovaj esperantistoj ne okazos ĉi-jare. Sed JEFO organizos la 4-an Franc-Germanan Junularan Renkontiĝon en Grésillon fine de Aŭgusto.

ĈU vi pagis vian abonon ?

SENDU BANKĈEKON al Babin 13 bd Chauvinière 44300 Nantes

POŝTĈEKKONTO: Nantes 2 813 61 L



La tuta familio legas nian revuon
KULTURAJ KAJEROJ
(listo de la perantoj sur la lasta kovril-paĝo)

LIBRO - SERVO

ĉe S-ino VINCENT, B.P.54, 49150 BAUGÉ

Nia katalogo estas havebla kontraŭ poŝtmarko.
Pagu vian mendon prefereble post ricevo de la fakturo. Aldonu 15% por sendkostoj.
Ĉekoj adresotaj al Maison Culturelle esperantiste, 49150 BAUGÉ

ATESTO pri PRAKTIKA LERNADO-

Dum la ekzameno, la kandidatoj rajtas uzi nur
LEXIQUE FONDAMENTAL de R. Léger (10 F.)

ATESTO pri KAPABLECO-

Por bone prepari tiun ekzamenon uzu la novan eldonon de
PREPARADO al la ATESTO pri KAPABLECO (30 F))
TRADUKPROPONOJ por la altradukaj tekstoj de la manlibro: 10 f.

Kaj ne forĝesu POR la PRAKTIKANTOJ, "vigla lernolibro", 25 F.

niajn perkorespondajn kursojn


niajn ilustritajn bondezirajn kartojn.

NIA KONKURSO

En ĉiu el la numeroj de la revuo aperontaj en 1986 estos proponitaj diversaj enigmoj kaj ludoj ; ili konsistigos konkurson, kies premioj estos :

- 1-a premio : 1 000 f.f.
por restado en Grésillon
- 2-a premio : 500 f.f.
por restado en Grésillon
- 3-a premio : 150 f.f.
por aĉetado de libroj ĉe nia Libro-Servo
- 4-a premio : 100 f.f.
por aĉetado de libroj ĉe nia Libro-Servo
- 5-a premio : 50 f.f.
por aĉetado de libroj ĉe nia Libro-Servo

Sendu la 1-an serion de respondoj **antaŭ la 30-a de aprilo** al Kulturaj Kajeroj, 13, bd de la Chauvinière, 44300 Nantes.



UNUA SERIO

- 1 — Ĉi sube vi trovos la titolojn de 5 konataj verkoj. Sed mankas la vokaloj. Trovu la kompletajn tekstojn de tiuj titoloj kaj la nomojn de la verkistoj :

Ĉ L VNS TRKSM

KNK L KNNM

KRD MN SNJRN

LS MN PRL PL

L VRDKT TSTMNT

- 2 — Jen la foto de viro. Kiu li estas ? Kiam li vivis ? Kie ? Kiu el liaj verkoj estis tradukita en Esperanto ? En kiu jaro ?

- 3 — Trovu la respondojn al tiuj demandoj (ili troviĝas en tiu ĉi numero de Kulturaj Kajeroj).

— Kial estis konstruita duobla ŝtuparo en la kastelo Chambord ?

— Kial la urbo Asizo estas vizitinda ?

— Kial la franca reĝo Francisko la 1-a portis krispon ?

— Kiu estas la signifo de la hispana vorto « vertugados » ?

— Kiu pentraĵo de Leonardo da Vinci estas en la franca muzeo Louvre, kvankam ĝi devus estis en Milano ?

- 4 — El libro de franca aŭtoro tradukita en 1952 ni elektis la suban tekston. Sed kiam ni rekopiis ĝin enŝoviĝis kvin eraroj. Bonvolu reĝustigi tiun tekston.

« Li tiam estis soldato, pasante sian servotempon en Le Havre, ne plu stulta ol aliulo, fakte kun iomete pesa intelekto. Dum la liberaj horoj sia pli granda plezuro estis promenado sur la kajo, kie troviĝas la birdokomercistoj ».

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (200 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (400 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (5,00 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (75 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (50 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10° - D ALICANTE - (1 100 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiōzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Aurorastraat, 4, 5631 KK EINDHOVEN, pĉk. 209721 (24 gld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bœ Marmarvn 2A Oslo 11 (55 kr.).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Federacio Brunngatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 20123 (60 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Weno nah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la Esperantista Kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.